ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO - FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Fünfter Jahrgang ★ Nr. 11 November 1952

Zonen nach Zungen

Tio estis la titolo de artikolo en la granda germana ĵurnalo „Die Welt", n-ro 244 de 20a de Oktobro 1952; la subtitolo estis „Kvar mondlingvaj teritorioj anstataŭ Esperanto".

Leginte tion, ĉu ne batis la koro de kelka Esperantisto pli rapide, sed ne pro ĝojo!? Ĉu li ne pensis, ke nun venis, por tiel diri, **nia fino?**

Nu, unue ni volas legi tiun artikolon en ĝiaj ĉefaj trajtoj, kaj poste iomete „meti ĝin sub la lupeon". Ĉi-sekve aperas ĝia (mallongigita) teksto, pro kompreneblaj kaŭzoj en Esperanto, kaj ni legu ĝin atente:

„Du eminentaj francaj fonetikistoj, Léonce Thonneret kaj Pierre Fouché, elpensis sistemon, kiu ebligos al preskaŭ la tuta loĝantaro de la Tero, interkompreniĝi sen helpo de ia natura aŭ artefarita mondlingvo. Por tion atingi ili proponas dividi la mondon en kvar lingvozonojn.

La I-a enhavas la lingvojn Hispanan, Anglan, Francan,
La II-a enhavas la lingvojn Rusan, Anglan, Francan,
La III-a enhavas la lingvojn Ĥinan, Anglan, Francan,
La IV-a enhavas la lingvojn Hindostanan, Anglan, Francan.

En ĉiu lingvozono la tri lingvoj estu instruataj en la mezaj kaj altaj lernejoj. En tiuj teritorioj, kie unu el la tri lingvoj estas jam landa lingvo, la lernado de la ceteraj du estu deviga. En la aliaj ŝtatoj de la koncerna zono la lernantoj devus lerni, laŭ elekto, du el la tri lingvoj. Tiamaniere preskaŭ la tuta loĝantaro kun meza klereco de la civilizita mondo havus minimume jam unu komunan lingvon. Tio validas por pli ol la duono de la 2 1/4 miliardoj da teraj loĝantoj. La loĝantaroj de landoj, kiuj havas n e n i u n el la „zonaj lingvoj" kiel landan idiomon (ekzemple Svedoj, Turkoj, Germanoj, Italoj ktp.), havus minimume unu komunan lingvon kun ĉiu el la supre nomitaj mondloĝantoj.

La praktikan aplikadon de tiu ĉi propono devus fari la UNO. La unua paŝo estus la verkado de taŭgaj lernlibroj kaj la elekto de taŭga instruistaro."

Jen! Kelkaj kromaj negravaj rimarkoj jam ne interesas nin. La esenco estas evidenta: For neŭtraleco ankaŭ sur lingva kampo, regu naciismo pura kaj plena! Estas interese,

Die Birke über dem Grabe

Frühlingsbirke, du stehst hier über dem Grabe der Schwester
herbstlich einsam und streust Blätter und Tränen darauf.
Deiner unschuldigen Brust will ich's vertrauen: Sie sproßte
d i r gleich, leise vom Hauch himmlischer Lüfte bewegt,
ach, und vermochte nicht zu bestehn dem Sturme des Winters;
säusle, jungfräulicher Baum, säusle der Schlafenden Ruh.

Johann Gottfried Herder.

La betulo super la tombo

Ho, printempa betul', vi staras sur tomb' de l' fratino
en aŭtuna solec', ploras foliojn sur ĝin.
Al via brusta la virga mi volas konfidi: ŝi ĝermis
same movata de l' spir' kaj de la blov' el ĉiel',
sed ŝi ne povis elteni la ŝtormon de l' vintro kruela;
flustru, ho virga betul', flustru ripozon al ŝi.

Tradukis Jofebo.

WK/108/1/77

„Herz der Welt" ... doch wessen Herz?

Viele der EP-Leser kennen gewiß den Film „Herz der Welt". Wer ihn gesehen und auch das Buch der Bertha von Suttner „Die Waffen nieder!" gelesen hat, wird wohl kaum noch eine gleichgültige Stellung zur Frage des Friedens und seiner unbedingten Notwendigkeit einnehmen. Jenes Buch ist in vielen Sprachen in Tausenden von Stücken erschienen (darunter auch in Esperanto), den Film werden sicher Hunderttausende gesehen haben. Und doch, man muß, wenn man kühl und ohne Sentimentalität seinen Ausgang überdenkt, sich eingestehen, daß eine Idee, die so unendlich gut ist, daß niemand ihre Größe leugnen kann, anscheinend dennoch Schiffbruch erlitten hat. Die mutige Baronin, die ihr Leben der Verbreitung des Friedensgedankens widmete, wird von der Nachricht, daß der erste Weltkrieg ausgebrochen ist, am Ende ihres Lebens sozusagen niedergeschlagen; k. o. geboxt, würde man heute vielleicht sagen. Hatte sie wirklich das Herz der Welt gerührt?

Wir Esperantisten, denen der Gedanke des Friedens ebenfalls heiß am Herzen liegt, für dessen Verwirklichung wir aber die Einführung einer allgemeinen Hilfssprache als unbedingt nötige Voraussetzung ansehen, haben auch schon — und nicht nur einmal — derartige Boxhiebe erhalten. Sie zwangen uns zu Boden, und manchmal war es uns schwer, noch vor dem Ausgezähltwerden wieder in die Höhe zu kommen. Aber stets erwiesen sich die dem Esperanto innewohnenden Kräfte als stark genug, neu zu beginnen, neu aufzubauen, neu die alten Bereiche wieder zu gewinnen und neue dazu zu erobern. Trotzdem, Narben sind geblieben, die Kräfte der alten Kämpfer sind geschwächt, und — leider Gottes! — wir bemerken nicht genug jugendliche Streiter, die die Lücken in unseren Reihen wieder auffüllen. Denn wir sehen es ja: die erste Generation der Esperanto-Streiter ist dahin, und auch die zweite ist zu einem großen Teil schon auf dem Kampffeld geblieben. So m u ß uns die Sorge erfüllen, was werden wird. Bertha von Suttner starb — als Ergebnis ihrer unermüdlichen Arbeit war ein Weltkrieg ausgebrochen; Dr. Zamenhof starb, und auch ihn hat derselbe Krieg gefällt. Zwar hat Esperanto ihn überlebt — und einen zweiten schrecklicheren noch dazu; aber sollten wir nicht etwas mehr für den Frieden tun, wir Esperantisten? Sollten wir uns nicht fragen, ob ein dritter Weltkrieg nicht zugleich mit allem anderen auch Esperanto völlig wegfegen würde? Können wir zum Beispiel damit einverstanden sein, daß Esperanto als Militärsprache Anwendung fände? Daß es dazu diene, das Zusammenspiel der schrecklichen modernen Kriegsmaschinerien noch reibungsloser zu gestalten?

Die Friedensbewegung — so könnte man wenigstens aus dem Film „Herz der Welt" schließen — hätte nie von der Kriegsfurie überrannt werden können, wäre nicht die Erfindung eines edlen Menschen wie Nobél in die falschen Hände geraten. Man hätte das Dynamit ja auch n u r friedlichen Zwecken dienstbar machen können. Man könnte andererseits mit Hilfe des Esperanto, wie schon gesagt, ein noch besseres Funktionieren der Kriegsmaschinerie bewirken. Wollen wir das?

Jedenfalls aber dürfte es keine großen Friedenskongresse mehr geben, wo die Teilnehmer sich nicht unmittelbar verstehen, wo sie sich auf den Krücken von Übersetzungen und Verdolmetschungen mühsam einander nähern. Esperanto steht allen dem Frieden dienenden Bestrebungen jederzeit zu Diensten. Warum wird es nicht verwendet? Könnte nicht eine große Esperanto-Friedensphalanx gebildet werden, durch alle Eisernen Vorhänge hindurch?

Das „Herz der Welt" ist wohl nur das Herz eines jeden Menschen, gleichgültig, wo immer er sei, das für den Frieden schlägt. Wenn alle felsenfest davon überzeugt sind, daß nur der Herzschlag des Friedens in der ganzen Welt das Pochen der Hämmer in den Waffenschmieden übertönen kann, dann werden auch diese gar bald keine Kraft mehr haben und früher oder später ihr angsteinflößendes Klopfen einstellen müssen. Und wir Esperantisten sind mit dazu berufen, mit Hilfe des Geschenks von Dr. Zamenhof an die Menschheit den Herzschlag des Friedens in der Welt zu verbreiten. Uns ermahnt dazu schon von den ersten Tagen unserer Samideaneco an das Wort:

Ne al glavo sangon soifanta ĝi la homan tiras familion! -r.

„Zonen nach Zungen"

ke la elpensintoj de tiu projekto estas Francoj, do anoj de popolo, kies lingvo jam dum certa epoko estis la mondlingvo de la kleraj popoltavoloj en la kultura mondo. Tiu reganta pozicio de la Franca lingvo perdiĝis, supozeble por ĉiam. Ĝia influo en multaj landoj, kie ĝi mastris inter la fremdlingvoj ankoraŭ antaŭ malmultaj jardekoj, estas for. Do, estas kompreneble, ke „patriotoj" klopodas rehavigi al ĝi la antaŭan gravecon. Tamen, la nuda realeco montras, ke tio jam ne estas ebla. Tro granda jam estas la superrego de la Angla, kaj tial ankaŭ ĉi tiu estas alprenata kiel samranga; tiamaniere oni esperas sekurigi la pozicion de la Franca. Efektive, ni vidas, ke ĉi tiuj du lingvoj havas la plimulton en ĉiuj kvar lingvozonoj. La sekvo estos sendube forta substreko kaj influigo de ĉi tiuj du lingvoj en ĉ i u j zonoj. Por vualigi ĉi tiun staton oni allasas kvar kromajn lingvojn, ne nur pro praktikaj celoj, sed por silentigi ties uzantojn.

Restas la lingvoj kaj popoloj ne konsideritaj. Ĉu efektive Germanoj, Araboj, Portugaloj, Japanoj ktp. ktp. rezignu por ĉiam, ke iliaj respektivaj lingvoj ludu iam rolon adekvatan al la signifo de la koncerna popolo? Ĉar estas ja sendube, ke la zonlingvaj nacioj gardus severege kaj jaluzege sian lingvan hegemonion.

Cetere, ĉu tiu plano estas efektive tiel nova kaj tiel miriga solvo, kiel oni unuavide volus kredi? Neniel! La lingvoj Franca kaj Angla estas jam de multaj multaj jaroj instruataj en preskaŭ ĉiuj mezaj kaj altaj lernejoj de la Tero. Ĉu per tio la lingva mizero kaj ĥaoso malaperis? Meti ĉi tiun demandon signifas ĝin nei. Do estas apenaŭ supozeble, ke plia disvastigo de tiuj du kulturlingvoj forigus la malfacilaĵojn ekzistantajn.

Ni Esperantistoj do ne timu tiun novan atakon. Ni havas multajn pluspunktojn kaj ni ne kaŝu ilin. Kompreneble ekzistas kromaj gravaj refutmanieroj, sed ĉi tiu artikolo volis nur efiki trankvilige por tiuj, kiuj ne tuj rekonis la ... nu, ni diru erarbazan argumentadon de la du Francaj sciencistoj. Cetere, ni ripetas, estas tre interese, ke tiu „solvo" venas ĝuste de Francaj sciencistoj.

El nia esperantista kuriozaĵujo

X kaj Y — Kial ne?

Unu el niaj cxefaj celoj devas cxiam esti la taygigo de nia lingvo en cxiuj rilatoj. Jam oft oni pritraktis la malfacilajxojn, kiujn kayzis la manko de supersignaj litertipoj. Zamenhof mem provis solvon per la propono, ke ni uzu la literon h por indiki la supersignan karakteron de la litero antaya. Pri la diftonga u-litero nia majstro diris nenion en tiu rilato.

Nu, ni devas konstati, ke la Zamenhofa solvo tute ne estas tayga, precipe en moderna Esperanto. Ni ja nuntempe ofte trovas konsonantfinan vortparton sekvatan de konsonantkomenca vortparto. Krome, grava principo en Esperanto estas, ke cxiu litero prezentu nur unu sonon, do, ke gxi estu uzata nur por unu celo.

Ni ne volas konfuzi la legantojn de niaj skribajxoj, kaj ni ankay ne volas tusxi ay ecx rompi fundamentain principojn. Samtempe ni ne trovas cxie la kondicxojn idealajn por ni, sed ni devas adapti nin al la kondicxoj ekzistantaj.

Tial la plej bona vojo por eligxi el tiu cxi dilemo estas la uzo de x kaj y cxie, kie ni ne povas disponi pri supersignaj literoj, do en telegrafado, telepresado, en cxiutagaj gazetoj, en masxinskribado, kaj tiel plu.

Ay cxu vi havis malfacilajxojn dum la legado de la supra teksto? — Certe ne. La litero x reprezentas bone la cirkumflekson, gxi ecx havas en si la ideon de kaj normala kaj inversa cirkumfleksoj. La litero y plejparte uzigxas en diftongoj, do kial ne ankay en nia lingvo? Krome gxi aspektas kiel la rusa litero u. Ni do ne hezitu, sed sengxene uzadu la literojn x kaj y cxie, kie ekzistas bezono, fari tion.

H. Breitenbach, Berlin-Neukölln, Briesestraße 67.



La Somera Universitato en Oslo

Klasado de lingvoj kaj la loko de Esperanto inter ili

W. E. Collinson: Londono (Britujo)

Oni klasas lingvojn laŭ du vidpunktoj: 1) oni sekvas la evoluadon de lingvo returne ĝis la plej fruaj epokoj kaj provas rekonstrui la praformon kaj la historian parencecon de lingvoj; 2) oni pristudas kaj priskribas la aktualan strukturon de lingvo ĉe difinita tempopunkto. Per 1) oni starigas lingvo-familiojn, ekz. la hind-eŭropan, ugra-finnan, semidan. Post ĉiuj esploroj multaj lingvoj ne povos kungrupiĝi — tamen, mankas la donitaĵoj por aserti, ke la homa lingvo originis diversloke. Ĉiuokaze la origino troviĝas en ne plu esplorebla prahistoria epoko.

Lastatempe la lingvuloj dediĉis multe da tempo al strukturaj problemoj, precipe la nederlandano de Groot en sia „Strukturele Syntaxis" kaj pluraj usonanoj kiuj multe profitas per la studoj de amerikaj lingvoj ĝis tiam ne taŭge analizitaj. La du ĉefaj vidpunktoj por klasado de lingvaj strukturoj estas a) la „morfologio" inkluzive de vortfarado, kaj b) la „sintakso" kiu ampleksas la vortgrupigon kaj frazkonstruadon. Ekzistas skalo de integreco kiu etendiĝas de lingvoj, kiuj havas nur plenvortojn aŭ „liberajn formojn" kaj tute malhavas finaĵojn aŭ aliajn modifilojn, ĝis lingvoj en kiuj la limoj inter eraj vortoj kaj frazoj estas preskaŭ forviŝitaj. La procedoj kiujn uzas lingvoj por formi vortojn kaj interrilatigi ilin gramatike, estas treege diversaj. Ofte sufiĉas ekz. la apudmeto de vortoj en difinita ordo. Multaj lingvoj formas per la kombino de plenvortoj kunmetaĵojn. Aliaj preferas afiksadon, ĉu per sufiksoj post la radiko, ĉu per sufiksoj antaŭ la radiko, ĉu — kiel ekz. kelkaj orientaj lingvoj kiaj la munda-idiomoj de Hindujo aŭ tagalaj de la Filipinoj — per infikso en la radiko mem. Kelkaj lingvoj faras grandan uzon de interna modifo, ekz. la araba kaj hebrea kiuj havas trikonsonantajn radikokadrojn, ekz. k-t-b „skrib-", en kiun oni povas meti diversajn vokalojn (katib, kitab, kutub ktp.) La bantulingvoj renversas nian eŭropan fleksiadon, metante la fleksion antaŭ la radikon (kp. germ. ge-kommen veninta), ekz. mu-rtu signifas „homo" kaj ba-rtu „homoj". Fine oni konstatas ke multaj lingvoj uzas prozodiajn rimedojn kiel la fortakcenton, la silabtonon aŭ gruptonon kaj la intermeton aŭ nuligon de paŭzoj por distingi vortseriojn aŭ sintaksajn konstruaĵojn.

Unuflanke de la skalo estas la ĉina, kiu maksimume uzas la principojn de izoleco (apudmeto en difinita ordo de plenvortoj) kaj analizeco (helpvortoj anstataŭ modifoj). La polineziaj lingvoj uzas kelkajn afiksojn en vortfarado, sed ne multe modifas la vortojn por gramatikaj celoj — parenteze la nuntempa angla lingvo emas al tiu stato! Lingvoj kiuj alĉenas al la radiko tutan serion da afiksoj (precipe sufiksoj) kiel la finna kaj turka, ofte nomiĝas „aglutinaj" kaj kelkaj asertis ke Esperanto estas tia lingvo, sed fakte ĝi estas nur tre malforte aglutinema kaj similas multrilate al la hind-eŭropaj tipoj. Kompleksajn frazvortojn kun enkorpigo de objektoj kaj kvalifikoj faras la baskaj dialektoj, multaj kaŭkazaj kaj nordamerikaj lingvoj inkl. de la eskima.

Esperanto estas tre utila komparilo kaj analizilo por klare elmontri la diversajn lingvo-tipojn.

Simpla kaj facile parkerebla nomo

La antaŭ nelonge naskita filo de la reĝo Phumiphon de Tajlando ricevis jenan nomon:

Lia reĝa moŝto Vajiralongkorn Boromchakrayadisorn Santatiwong Thevetthamrong-Suboribarn Abhigunooprakarn-Mahitladuldej Phumiphon-naveretvarangkur Kittisirisom-Booranasawangkawadh Boromkattiyarajkumar

aŭ mallonge: Princo Vajiralongkorn.

Bedaŭrinde oni ne sciigis, kion signifas tiu serpentego da nomo.

Der Deutsche Esperanto-Kongreß 1953 in Frankfurt a. M.

22. bis 26. Mai 1953

Die Frankfurter Esperantisten haben für 1953 die Jahreshauptversammlung des DEB in ihre Stadt eingeladen; das allein rechtfertigt schon, daß in der Überschrift von einem Kongreß gesprochen wird. Gleich nach Düsseldorf wurde die Arbeit aufgenommen, und schon sind wichtige Beschlüsse gefaßt und Entscheidungen getroffen worden, die nachstehend veröffentlicht werden.

Zunächst wurde ein Lokoko gewählt. Es besteht aus einer Sekretärin (Frau Else Hoffmann, Arnsburger Straße 2), einem Präsidenten (Herr Josef W. Wolter, Zum Linnegraben 12) und einem Kassierer (Herr Franz X. Rabl, Pützerstr. 102).

Für Wohnungsfragen ist verantwortlich: Herr Anton Messmer, Praunheimer Landstr. 116;

für Anmeldefragen: Frau Elli Rabl, Pützerstr. 12;

für Ausstellungsfragen: Herr Ludwig Herr, Oberursel i. T., Hohemarkstr. 86;

für Postangelegenheiten: Herr Burkard Bös, Ludwig-Landmann-Str. 6;

für den Kindergarten: Fr. Auguste Spitz, Ebelfeld 251.

Auch das Programm steht schon in großen Zügen fest:

Freitag, 22. Mai:

19 Uhr: Sitzung des Kongreß-Komitees mit dem DEB-Vorstand;

Samstag, 23. Mai:

9 Uhr: Sitzung des erweiterten Vorstandes des DEB,
14 Uhr: Jahreshauptversammlung,
20 Uhr: Unterhaltsamer Abend (großes Programm);

Sonntag, 24. Mai:

10 Uhr: Akademische Feier,
14 Uhr: Autobus-Ausflug in den Taunus, voraussichtlich zur Salburg;

Montag, 25. Mai:

9 Uhr: Beginn der verschiedenen Fachsitzungen, Gleichzeitig Führungen in den Palmengarten, Zoo und in das Goethehaus.

Montag, 25. Mai:

Nach dem Mittagessen gemeinsamer Schiffsausflug nach Schwanheim, wo Kaffee getrunken wird;

Dienstag, 26. Mai:

10 Uhr: Offizielle Prüfung vor der Prüf.-Kommission Frankfurt,
15 Uhr: Abschiedstreffen mit der Frankfurter Gruppe, voraussichtlich in deren Heim, mit kleinem Programm.

Und — ganz wichtige Frage — wie hoch ist der Kongreßbeitrag?

Je Person 5,— DM; Eheleute, die beide dem DEB angehören, zusammen 8,— DM; Jugendliche (14—21 Jahre) 3,— DM. Wer sich nach dem 1. April 1953 anmeldet, zahlt 2,— DM mehr (kein Aprilscherz!).

Wer sich früh anmeldet und seinen Beitrag bezahlt, kann in den Genuß eines Freiquartiers kommen; also . . .?

In Kongreßsachen schreibe man stets an die Sekretärin, Frau Else Hoffmann, Frankfurt a. M., Arnsburger Straße 2.

La Redakcio de „Esperanto-Post" disponigis al la junaj germanaj esperantistoj tiun ĉi paĝon. Ni tre dankas al ĝi pro tio, ĉar per tio ni nun havas la spacon por la aperigo de artikoloj, kiuj speciale interesas la junularon, kaj krome por komencigi leteran diskutadon pri la publikitaj leteroj inter niaj anoj kaj amikoj.

Por la fruktedona efektivigo de tiu nia intenco estas necese, ke vi skribu vian opinon pri la temo de la artikolo al la redaktoro de la Junulara Paĝo. Li poste klopodos kunmeti ĉiujn alskribaĵojn tiel, ke la legantoj de tiu revuo ekhavos klaran bildon pri la opinio de niaj aktivuloj.

La unua aperigita artikolo estas pri la lingva problemo en la eŭropa armeo. Certe, pri tiu temo ekzistas inter ni la plej diversaj opinioj, kaj tiujn opiniojn ekkoni nin interesus. Estas do necese, ke la kontraŭuloj de la enkonduko skribu, sed ankaŭ grave, ke la rekomendantoj aldonu plurajn kialojn, kiuj parolas por la enkonduko.

Prenu do la skribilojn kaj, leginte la artikolon, skribu tuj al la redaktoro de la Junulara Paĝo, Werner Bormann, Flensburg-Mürwig, Blücherstr. 17. Li jam atendas vian leteron.

Ĉu Germana Esperanto-Junularo akcelu la enkondukon de Esperanto en Eŭropa Armeo?

Ĉi-supra demando lastatempe stariĝis antaŭ ni esperantistoj. Diskutinte kun gejunuloj el niaj rondoj pri tiu temo mi renkontis fervorajn anojn kaj akrajn kontraŭulojn. Ambaŭ havas gravajn argumentojn por siaj konceptoj. La radikalaj kontraŭuloj malakceptas la enkondukon de Esperanto en armeo, ĉar ili estas principaj malamikoj de armado ĉia; ili asertas, ke Esperanto estis nur kreata por pure pacaj celoj, ĝia uzado en soldataro renversus ĝin en ĝian kontraŭon. Alia parto ne pro absoluta malfavoro al armeo rifuzas labori por Esperanto en eventuala eŭropa armeo, sed nur pro la timo, ke per tio GEJ kiel parti-politike neŭtrala organizo enmiksiĝus en politikajn aferojn. — Sur la alia flanko staras tiuj, kiuj rekomendas kaj provas ĉe ĉiu ajn — oportuna kaj maloportuna — okazo, per ĉia ajn — ĉu taŭga, ĉu stranga aŭ eĉ ridiga — maniero la enkondukon de Esperanto ie ajn, kvankam ili kelkfoje nur vekas la malsimpation en la publiko per sia agado.

Mi kredas ke ni, iom pli profunde ol ambaŭ partoj faras, devas pripensi kaj pritrakti tiun problemon. Unue mi akcentu: GEJ kiel sendependa kaj partipolitike neŭtrala movado rajtas preni pozicion nek por nek kontraŭ germana rearmado; tio tute ne signifas, ke niaj membroj persone ne havu firman opinion pri tiu gravega problemo. Sed ĉu vere la laboro por la akcepto de Esperanto en eŭropa armeo — se ĝi fakte stariĝus — fare de GEJ estus politika decido? Laŭ mia opinio absolute ne! Ĉar ni tutsimple nur konstatas la ekziston de tia armeo, ĉu ĝi estas al ni agrabla aŭ ne. Kial ni tiam ne eluzu bonan ŝancon, kiu malfermiĝas al ni?

Por pruvi, ke ne temas pri politika agado, ni prenu alian, tute aktualan ekzemplon, pri kiu verŝajne neniu esperantisto ĝis nun meditis: En kelkaj landoj germanaj de tempo al tempo okazas akregaj bataloj pro la formo de la lerneja sistemo: ĉu konfesia aŭ simultana lernejo, kiel momente ĉe ni en la plej nova lando aŭ antaŭ nelonge en Nordrhein-Westfalen. Oni ne diru, ke tiu problemo estas malgrava aŭ akcesora; ĉiu kiu ĝuste komprenas la sencon de tia batalado pro la lerneja formo, scias, ke tio estas unu el la plej eminentaj problemoj en nia politika kaj kultura vivo; ĉar de la eduko, kiun ricevas la infanoj en la unuaj jaroj, dependas poste grandparte ilia sintenado en la tuta vivo. Se mi nun ekz. laŭ mia politika aŭ religia koncepto preferas la konfesian lernejon, dum en mia lando ekzistas la simultana sistemo: ĉu mi tiam ne tamen laboru por la uzado de Esperanto en tiuj lernejoj de mi malaprobataj? La sama nature validas ankaŭ inverse. Kaj kiu esperantisto faris al Esperanto-organizo riproĉojn, ĉar ĝi subtenis la enkondukon de Esperanto en tiaj lernejoj, kvazaŭ ĝi per tio aprobus la ekzistantan formon? Verŝajne neniu; ĉar fakte la esperantistoj per sia agado ne aprobas la koncernan lernejan sistemon, sed nur konstatas ĝian ekziston.

Kaj ekzakte la sama validas por la enkonduko de Esperanto en eventuala eŭropa armeo fare de GEJ kaj parencaj organizoj: ni ne aprobas (nek malaprobas), sed nur realisme konstatas. Do ne povas temi pri politika agado. Kaj la alia argumento: principa malaprobo de armeo kaj tial ankaŭ neuzo de Esperanto en ĝi? Mi ĉi tie ne volas diskuti pri militserv-rifuzado, sed nur demandi serioze kaj severe ĝiajn anojn, ĉu ili ankaŭ jam pripensis la konsekvencojn, rezultantajn el ilia principa malkonsento kun enkonduko de Esperanto en armeo? Tiam ili ankaŭ ne plu rajtas batali por ĝia enkonduko en lernejoj! Aŭ ĉu iu kredas, ke post akcepto de Esperanto en la lernejoj oni ne jam morgaŭ uzus ĝin ankaŭ en la eŭropa armeo? La koncernaj kompetentuloj ja estus stultuloj laŭ la propra vidpunkto, se ili ne uzus tian bonan ilon. Do per la propagando de Esperanto en lernejoj, universitatoj ktp. ankaŭ la mondkonceptaj kontraŭuloj de armado nerekte subtenas la enkondukon en la armeon; kaj ĉu rekte, ĉu nerekte, ili ĉiuokaze helpas; tio estus la sama, kiel se militservrifuzanto dum milito fabrikus armilojn en fabriko aŭ laborus sur alia grava posteno en la hejmlando, kiu eble nerekte rilatas la militon. Tamen mi ĝis nun renkontis neniun, kiu pro la nomitaj konsekvencoj retiriĝis el la poresperanta laboro en lernejoj kaj similaj instancoj. Ŝajnas do al mi, ke la du argumentoj ne devus influi la agadon de GEJ.

Sed ni ankoraŭ iru paŝon plu: Estas memkompreneble, ke kelkaj el la **per**esperantaj organizaĵoj, ekz. SAT, kiel organizaĵoj pro siaj konceptoj ne povas favori la enkondukon de Esperanto en armeo. Sed tio ne validas por la **por**esperantaj organizaĵoj, kiel GEJ kaj aliaj. Ĉar malgraŭ nia grava peresperanta laboro ankaŭ la disvastigo kaj oficialigo de Esperanto estas nia tasko kaj celo. Kaj jen prezentiĝas al ni granda ŝanco; ĉar la aŭtoroj de la EVG-kontrakto *) mem jam ekkonis la estiĝontajn lingvajn malfacilaĵojn. El la diversaj ekzemploj favoraj por ni mi nur citu el la unua aldona protokolo ĉapitron V, art. 28, § 3, kiu laŭvorte tekstas jene (laŭ la oficiala germana traduko): „Soweit sich aus praktischen Notwendigkeiten die Kenntnis einer gemeinsamen Hilfssprache als erforderlich erweist, wird nach Bestimmungen, die vom Kommissariat mit einstimmiger Zustimmung des Rates festzulegen sind, in den Ausbildungsschulen ein solcher Unterricht erteilt werden." Do ni zorgu, ke Esperanto estos tiu helplingvo! Kaj post eventuala akcepto flanke de la armeo la registaroj de si mem enkondukos ĝin en la lernejojn (ankaŭ tion cetere aludas la kontrakto en alia paragrafo); kaj tiam ni povas esperi, ke de tie disvastiĝos Esperanto en la aliaj eŭropaj instancoj kaj — se ĝi pruviĝos bona, pri kio ni esperantistoj ne dubas — ankaŭ en aliaj internaciaj rondoj, kunvenoj ktp. Nur iam devas esti farata komenco.

Kiu tute ne povas kvietiĝi pensante pri uzo de Esperanto en armeo, pripensu, kiom da bona ĝi ankaŭ tie povas instigi inter la anoj de diversaj nacioj kaj precipe en la rilatoj de la soldatoj al la loĝantaro de fremda lando, kie ili soldatservas. Ni en Freiburg jam kelkfoje havis bonegan kontakton kun junaj francaj soldatoj esperantistaj ĉi tie dejorantaj; ili ĉeestis niajn kunvenojn, migris, kantis kun ni ktp. Plue ni esperantistoj ja estas konvinkitaj, ke per la konstanta praktika uzado de Esperanto, per la kunestado kaj kontakto kun fremdlandanoj, kun kiuj oni facile povas interparoli kaj interkompreniĝi, iom post iom la menso alkutimiĝas al pli vasta kaj internacia pensado, al pli alta estimo de fremdaj popoloj ks., kaj mi kredas ke, si ie tia pensmaniero estas necesa, tiam certege ĉe soldataro.

Sed estas ankoraŭ alia fakto, kiu devigas nin esperantistojn tuj ekagi sur tiu kampo: ankaŭ la adeptoj de aliaj mondlingvoj vekiĝis kaj fariĝas aktivaj; mi precipe menciu la anojn de Interlingue, IALA, Occidental ks. Tion i. a. povis ĉiu konstati, kiu la 14-an de septembro 1952 aŭskultis serioze la dissendon de NWDR pri la lingva problemo. Se ili — spite al la relativa malboneco de siaj projektoj kompare kun Esperanto — sukcesus enpenetri la eŭropan armeon, tiam i l i havus antaŭ si la venkan vojon, pri kiu mi antaŭe parolis favore al Esperanto. Tiam ni certege povos por ĉiam enterigi nian karan lingvon.

Do ni nepre ne hezitu, sed kaptu tiun grandan, eble lastan ŝancon por realigi niajn celojn. Por skribi tian artikoleton oni ne bezonas esti ano de la rearmado; sobra kaj realisma rigardado al la nuna situacio devigas laŭ mia opinio ĉiun esperantiston — kaj do ankaŭ GEJ — al tiu vojo, kvankam li eble por sia persono estas firma kontraŭulo de rearmado. Mi esperas de la estraro de nia GEJ, ke ĝi post serioza preparo en kunlaboro kun GEA kaj la alilandaj organizaĵoj entreprenos la necesajn paŝojn en tiu ĉi direkto.

Bernd Müller, 23 j., Freiburg, cand.rer.pol.

*) EVG = EDO (Eŭropa Defend-Organizo)

Josef von Eichendorff

El la vivo de Netaŭgulo

ROMANTIKA NOVELO · TRADUKO EL LA GERMANA LINGVO DE PAUL BENNEMANN

(Fino)

Mia impostodomo, kiun mi devis preteriri, staris ankoraŭ sur la sama loko; la altaj arboj el la sinjora ĝardeno muĝis ankoraŭ super ĝi; flavemberizo, kiu iam ĉe la sunsubiro ĉiufoje kantis sian vesperkanton sur la kaŝtanarbo antaŭ la fenestro, ankaŭ ree kantis, kvazaŭ depost tiu tempo nenio estus okazinta en la mondo. La fenestro en la impostodomo estis nefermita; plena de ĝojo mi alkuris kaj enŝovis la kapon en la ĉambron.

Neniu enestis; sed la murholoĝo ankoraŭ trankvile tiktakis, la skribotablo staris ĉe la fenestro kaj la longa pipo en angulo, kiel iam. Mi ne povis rezisti, ensaltis tra la fenestro kaj eksidis ĉe la skribotablo antaŭ la granda kalkullibro. Jen la sunbrilo ree falis verd-ore tra la kaŝtanarbo antaŭ la fenestro sur la ciferojn en la libro; la abeloj ree zumis tien kaj tien ĉe la malfermita fenestro; la emberizo ekstere sur la arbo gaje kantis senfine.

Sed subite la pordo de la ĉambro malfermiĝis eksteren, kaj maljuna, longa impostisto en mia punkthava dormsurtuto eniris. Li haltis en la pordo, kiam tiel neatendite li ekvidis min, rapide deprenis la okulvitrojn de la nazo kaj furioze rigardis min. Sed mi ne malmulte ektimis pri tio, saltekstaris ne dirante unu vorton kaj kuris el la dompordo tra la malgranda ĝardeno, kie miaj piedoj preskaŭ estus implikiĝintaj en la malagrabla terpomherbo, kiun la maljuna impostisto nun, kiel mi vidis, laŭ la konsilo de l' pordisto estis plantinta anstataŭ miaj floroj. Mi aŭdis ankoraŭ, kiel li elkuris antaŭ la pordon kaj insultis malantaŭ mi; sed mi jam sidis supre sur la alta ĝardenmuro kaj kun batanta koro enrigardis en la kastelĝardenon.

Tie estis bonodorado kaj briletado kaj ĝojkriado de ĉiuj birdoj; la placoj kaj vojoj estis senhomaj, sed la orumitaj arbopintoj kliniĝis antaŭ mi en la vespera vento, kvazaŭ ili volus bonvenigi min, kaj flanke el la profunda valo la Danubo kelkiam fulmis tra inter la arboj supren al mi.

Subite mi aŭdis el ioma malproksimo kantadon:

Kiam homa bru' silentas,
tero kantas per la arboj
kaj la kampoj per la garboj,
kion preskaŭ kor' ne sentas —
afliktiĝojn, kiuj vagas
tremetige kaj zigzagas
kiel fulmoj tra la brust'.

La voĉo kaj la kanto sonis al mi tiel strange kaj tamen bonkonate, kvazaŭ mi aŭdis ilin iam ajn en sonĝo. Longe, longe mi meditis. — „Tio estas sinjoro Guido!" mi kriis fine plena de ĝojo kaj rapide svingis min malsupren en la ĝardenon — estis la sama kanto, kiun li kantis en tiu somera vespero sur la balkono de la itala gastejo, kie mi vidis lin la lastan fojon.

Li kantis ankoraŭ plu; sed mi saltis trans bedojn kaj hekojn en direkto al la kanto. Kiam fine mi elpaŝis el inter la lastaj rozarbetaĵoj, mi subite haltis kiel ensorĉita. Car sur la verda placo ĉe la cignolageto, plene lumigate de la vespera ruĝo, sidis la bela sinjorina moŝto, en belega vesto kaj kun krono el blankaj kaj ruĝaj rozoj en la nigra hararo, kun mallevitaj okuloj, sur ŝtonbenko kaj dum la kantado ludis per la rajdbastono sur la herbokovro antaŭ si, ĝuste tiel, kiel iam en la boato, kiam mi devis kanti antaŭ ŝi la kanton pri la bela sinjorino. Kontraŭe de ŝi sidis alia juna sinjorino, kiu estis klininta la blankan, rondan nukon plenan de brunaj bukloj kaj kantis akompanate per la gitaro, dum ke sur la silenta lageto la cignoj malrapide ĉirkaŭnaĝis.

Jen la bela sinjorino subite levis la okulojn kaj laŭtekkriis, ekvidante min. La alia sinjorino rapide sin turnis al mi, tiel ke la bukloj flugis en ŝian vizaĝon; kaj precize rigardante min, ŝi komencis senmezuran ridadon, poste saltis de sur la benko kaj trifoje klakis per la manetoj.

En la sama momento granda aro da malgrandaj knabinoj en florblankaj, mallongaj vestetoj kun verdaj kaj ruĝaj bantoj venis elglitantaj el inter la rozarbetaĵoj, tiel ke mi tute ne povis kompreni, kie ili ĉiuj estis kaŝiĝintaj. En la manoj ili tenis longan florgirlandon, rapide formis cirklon ĉirkaŭ mi, ĉirkaŭdancis min kaj kantis:

Por geedziĝa fest' jen kron'
kun silko violblua!
Al danco ni kondukas vin,
al ludo ĝoje brua.
Bela, verda florokron',
violblua silko!

Tio estis el la „Freischütz". Kelkajn el la malgrandaj kantantinoj mi nun ankaŭ reekkonis; ili estis knabinoj el la vilaĝo. Mi pinĉis iliajn vangojn kai volonte estus elfuginta el la cirklo; sed la malgrandaj petolemaj ulinetoj ne ellasis min. Mi tute ne sciis, kion do la afero signifu, kaj staris tute perpleksa.

Jen subite juna viro en eleganta ĉasvesto elpaŝis el la arbetaĵo. Mi preskaŭ ne fidis al miaj

okuloj — estis la gaja sinjoro Leonhard! La malgrandaj knabinoj malfermis nun la cirklon kaj subite staris kiel ensorĉitaj ĉiuj senmove sur unu gambeto, etendante la alian en la aeron kaj dume per ambaŭ brakoj tenante la florgirlandon alten super la kapoj. Sed sinjoro Leonhard prenis la manon de la bela sinjorina moŝto, kiu daŭris ankoraŭ stari tute senmove kaj nur kelkiam transrigardis al mi, kondukis ŝin al mi kaj diris:

„La amo — pri tio ja konsentas ĉiuj sciencistoj — estas unu el la plej kuraĝigaj ecoj de l' homa koro; la bastionojn de rangoj kaj klasoj ĝi frakasas teren per unu fajra rigardo; la mondo estas tro malvasta por ĝi kaj la eterneco tro mallonga. Jes, ĝi estas versence la poetmantelo, kiun ĉiu fantaziulo unufoje dum la vivo volvas ĉirkaŭ si en la malvarma mondo, por elmigri al Arkadio. Kaj ju pli du disigitaj geamantoj migras malproksime unu de la alia, des pli multe la vojaĝvento plenblovas malantaŭ ili kurbfalde la multkolore briletantan mantelon, des pli eksterordinare kaj surprize evoluas la faldaro, des pli kaj pli longe kreskas tiel talaro post la geamantoj, ke neŭtralulo ne povas iri tra la pejzaĝo, sen ke li paŝus neatendinte sur kelkajn tiajn trenaĵojn. Ho plej kara sinjoro impostisto kaj fianĉo! Kvankam en tiu ĉi mantelo vi pompe paŝis ĝis la bordoj de la Tiber, tamen la malgranda maneto de via ĉi tie ĉeestanta fianĉino firmtenis vin ĉe la ekstrema fino de la trenaĵo; kaj kiom ajn vi baraktis kaj violonludis kaj bruis, vi tamen devis reveni sub la devigan trankvilon de ŝiaj belaj okuloj. — Kaj nun, ĉar ĉio tiel evoluis, vi du karaj, karaj, strangaj homoj! prenu ĉirkaŭ vin tiun feliĉigan mantelon, tiel ke la tuta alia mondo ĉirkaŭ vi subiras — amu unu la alian, kaj estu feliĉaj!"

Sinjoro Leonhard estis ĵus fininta sian predikon, tiam ankaŭ la alia juna sinjorino, kiu antaŭe estis kantinta, venis kontraŭ mi, rapide metis freŝan mirtokronon sur mian kapon kaj ĉi-kune kantis tre ŝerceme, dum ke ŝi ŝovetis la kronon, ĝis ĝi sidis fikse sur miaj haroj, kaj ŝia vizaĝeto dume estis proksimega antaŭ mi:

Tial mi vin tre favoras
kaj ornamas kapon vian,
ĉar per via violono
vi ĝojigis koron mian.

Tiam ŝi ree iris kelkajn paŝojn returne. „Ĉu vi konas ankoraŭ la rabistojn, kiuj iam en la nokto skuante vin malsuprenigis de la arbo?" ŝi diris, farante al mi riverencon kaj ĉi-kune rigardante min tiel ĉarme kaj gaje, ke mia koro vere ridis en la brusto.

Poste, neatendante mian respondon, ŝi ĉirkaŭiris min. „Vere, li estas ankoraŭ tute la iama, sen ia itala kungusto! Sed ho! rigardu do la dikajn poŝojn!" Ŝi subite kriis al la bela sinjorina moŝto, „violono, tolaĵo, raztranĉilo, vojaĝkofro — ĉio intermiksita!" Ŝi turnis min ĉiuflanken kaj pro ridado ne povis trankviliĝi.

Dume la bela sinjorina moŝto ĉiam estis ankoraŭ silenta kaj tute ne volis levi la okulojn pro honto kaj konfuziĝo. Ofte ŝajnis al mi, kvazaŭ sekrete ŝi koleris pri la multa babilado kaj ŝercado. Fine larmoj falegis subite el ŝiaj okuloj, kaj ŝi kaŝis sian vizaĝon ĉe la brusto de la alia sinjorino. Tiu unue rigardis ŝin mirigite kaj poste ŝin kore premis al si.

Sed mi staris tute perpleksa. Ĉar ju pli precize mi rigardis la fremdan sinjorinon, des pli klare mi ekkonis ŝin, estis vere neniu alia ol — la juna pentristo sinjoro Guido!

Mi tute ne sciis, kion diri, kaj ĵus volis demandi pli detale, kiam sinjoro Leonhard iris al ŝi kaj sekrete kun ŝi interparolis.

„Ĉu do li eble ne jam scias?" mi aŭdis lin demandi.

Ŝi skuis la kapon.

Tiam mi meditis momenton. „Ne, ne", li diris fine, „estas necese, ke li rapide eksciu ĉion; alie ekestos denove konfuziĝo kaj babiladoj."

„Sinjoro impostisto", li nun turnis sin al mi, „ni ne havas nun multan tempon; sed faru al mi la komplezon kaj finmiru ĉi tie kun plejebla rapido, por ke poste per demandoj, ekmiro kaj kapskuoj vi ne revivigu inter la homoj pasintajn aferojn kaj ne elskuu novajn eltrovojn kaj supozojn."

Tion dirante li tiris min pli profunden en la arbetaĵon, dum ke la fraŭlino skermis en la aero per la rajdbastono, formetita de la bela sinjorina moŝto, kaj skuis ĉiujn siajn buklojn tute sur la vizaĝon, tra kiuj tamen mi povis vidi, ke ŝi ruĝiĝis ĝis la frunto.

„Nu", diris sinjoro Leonhard, „fraŭlino Flora, kiu nun ĉi tie volas ŝajnigi, kvazaŭ ŝi nenion estus aŭdinta kaj sciinta pri la tuta afero, estis iam rapide interŝanĝinta sian koreton kun aliulo. Poste venas alia kaj prezentas al ŝi kun prologoj, tamburegoj kaj trumpetoj s i a n koron kaj deziras kompense ŝian. Sed ŝia koro estas jam ĉe iu kaj ies koro ĉe ŝi, kaj la iu ne volas repreni sian koron kaj ne redoni ŝian. Tuta la mondo krias — sed vi eble ankoraŭ ne legis romanon?"

Mi neis.

„Nu, sed vi kunagis en unu tia. Por diri mallonge: estis tia konfuzo de la koroj, ke la iu — tio estas mi — fine devis ekdirekti la aferon proprapersone. En varmeta somera nokto mi svingis min sur mian ĉevalon, levis la fraŭlinon kiel pentriston Guido sur la alian — kaj nun for al la sudo, por kaŝi ŝin en unu el miaj solecaj kasteloj en Italujo, ĝis kiam la kriado pro la koroj estos ĉesinta. Sed oni eltrovis nian vojon; kaj de sur la balkono de la itala gastejo, antaŭ kiu vi tiel bonege gardodormis, Flora subite ekvidis niajn persekutantojn." —

Ĉu do la ĝibhava sinjoro —?"

„— estis spiono. Tial ni sekrete retiriĝis en la arbarojn kaj igis vin sola veturi pluen sur la antaŭe mendita poŝtlinio. Tio trompis niajn persekutantojn kaj krome ankoraŭ — tute superflue — miajn servistojn en la montkastelo, kiuj atendis ĉiuhore la trompvestitan Flora'n kaj, uzante pli da servofervoro ol da saĝeco, prenis vin kiel la fraŭlinon. Eĉ tie ĉi en la kastelo oni kredis, ke Flora loĝis sur la roko; oni demandis, skribis al ŝi — ĉu vi ne ricevis letereton?"

Ĉe tiuj ĉi vortoj mi fulmrapide eltiris la papereton el la poŝo.

„Do tiu ĉi letero —?"

„— estas al mi", diris fraŭlino Flora, kiu ŝajne neniel atentis ĝis nun nian interparolon, rapide fortiris la papereton el mia mano, tralegis ĝin kaj ŝovis en la korsaĵon.

„Kaj nun", diris sinjoro Leonhard, „ni rapide devas iri en la kastelon; tie jam ĉio atendas nin. Kaj je la fino, kiel estas memkompreneble kaj dece por bonevoluigita romano: malkaŝo, pento, interpaciĝo; ni ĉiuj ree estas gaje kunaj, kaj postmorgaŭ estos la geedziĝa festo!"

Kiam ankoraŭ li tiel parolis, subite estiĝis en la arbetaĵo furioza bruego de tamburegoj kaj trumpetoj, kornoj kaj trombonoj. Kanonetoj pafis, oni vivu-kriis, la malgrandaj knabinoj denove dancis, kaj el ĉiuj arbetaĵoj elvenis kapo super kapo, kvazaŭ ili kreskus el la tero. En la svarmado kaj dancado mi saltis ulnojn alten de unu flanko al la alia; sed ĉar jam malheliĝis, mi nur iom post iom distingis la konatajn vizaĝojn. La maljuna ĝardenisto batis la tamburegojn, la Prahaj studentoj en siaj manteloj muzikis meze de la amaso, apude la pordisto fingrumis sur sia fagoto kiel freneza. Kiam mi ekvidis lin tiel neatendite, mi tuj kuris al li kaj forte lin ĉirkaŭprenis. Sekve de tio li tute eraris en la takto. „Nu vere; eĉ se li vojaĝus ĝis la fino de l' mondo, li estas kaj restas frenezulo!" li kriis al la studentoj kaj tute furioze blovis plu.

Dume la bela sinjorina moŝto estis kaŝe forkurinta pro la bruado kaj flugis kiel ektimigita kapreolo super la herbokovro pli profunden en la ĝardenon. Mi rimarkis tion ankoraŭ ĝustatempe kaj plej rapide kuris post ŝi. La muzikantoj en sia fervoro neniel rimarkis tion; ili opiniis poste, ke ni jam estis irintaj al la kastelo; kaj la tuta bando nun ankaŭ tien ekmarŝis kun muziko kaj granda bruado.

Sed ni preskaŭ samtempe estis alvenintaj en pavilono, staranta ĉe la deklivo l' ĝardeno, kun fenestro malfermita al la vasta profunda valo. La suno jam antaŭlonge estis subirinta malantaŭ la montoj, briletis nur kiel ruĝeta nebuleto ankoraŭ super la varma, mallaŭtiĝinta vespero, el kiu la Danubo des pli aŭdeble muĝis supren, ju pli ĉirkaŭe fariĝis silente.

Mi rigardis fikse la belan grafinon, kiu varmiĝinta pro la kurado staris proksimege antaŭ mi, tiel ke mi vere povis aŭdi, kiel batis ŝia koro. Sed mi nun tute ne sciis, kion paroli pro respekto, kiam subite mi estis tiel sola kun ŝi. Fine mi prenis kuraĝon, ekkaptis ŝian malgrandan, blankan maneton — tiam ŝi rapide min tiris al si kaj kuŝiĝis ĉe mia kolo, kaj mi ĉirkaŭprenis ŝin forte per ambaŭ brakoj.

Sed rapide ŝi reliberigis sin kaj tute konfuzite sin apogis sur la fenestron, por malvarmetigi siajn ardantajn vangojn en la vesperaero.

„Aĥ", mi kriis, „mia koro estas ĝuste krevonta, sed mi ankoraŭ ne povas ĉion bone kompreni; ĉio estas al mi ankoraŭ kiel sonĝo!"

„Al mi ankaŭ", diris la bela sinjorina moŝto. „Kiam en la pasinta somero", ŝi daŭrigis post ioma tempo, „mi revenis kun la grafino el Roma kaj ni estis feliĉe trovintaj la fraŭlinon Flora kaj kunrekondukis ŝin, sed nenion aŭdis pri vi, nek tie nek ĉi tie — tiam mi ne pensis, ke ĉio ankoraŭ tiel okazos! Nur hodiaŭ tagmeze la ĵokeo, la bona rapida bubo, senspire galopis en la korton sciigante, ke vi venos per la poŝtŝipo."

Poste ŝi ridis kaŝe en sin. „Ĉu vi scias ankoraŭ", ŝi diris, „kiel vi tiam vidis min la lastan fojon sur la balkono? Estis same kiel hodiaŭ, ankaŭ tiel kvieta vespero kaj muziko en la ĝardeno."

„Kiu do mortis depost tiam?" mi demandis rapide.

„Kiu mortis?" diris la bela sinjorino kaj mirigite rigardis min.

„Sinjoro la edzo de via moŝto", mi respondis, „kiu tiam kunstaris sur la balkono?"

Ŝi tute ruĝiĝis. „Kiajn strangaĵojn vi havas en via kapo!" ŝi ekkriis; „tiu estis ja la filo de la grafino, ĵus reveninta de siaj vojaĝoj, ĝuste je mia naskiĝtago. Tial li kunkondukis min sur la balkonon, por ke mi ankaŭ ricevu vivukrion. Sed pro tio vi eble tiam forkuris de tie ĉi?"

„Ho Dio, jes, certe!" mi kriis, frapante la frunton per la mano. Sed ŝi skuetis la kapeton kaj ridis tre kore.

Mi sentis min tiom agrabla, kiam ŝi babilis tiel ĝoje kaj intime apud mi; mi estus dezirinta aŭskulti ĝis la mateno. Mi estis vere gaja el tuta mia animo kaj kaptis plenmanon da migdaloj el la poŝo, kiujn mi estis kunportinta ankoraŭ el Italujo. Ŝi ankaŭ prenis de ili, kaj tiam ni krakmalfermis ilin kaj kontente elrigardis en la kvietan pejzaĝon.

„Vidu", ŝi ree diris post ioma tempo, „la blankan kastelon, kiu tie transe briletas en la lunlumo, tiun la grafo estas donacinta al ni, kune kun la ĝardeno kaj la vitejoj; tie ni loĝos. Li sciis jam delonge, ke ni havas reciprokan inklinon, kaj estas tre fervora al vi; ĉar se vin li ne estus kunhavinta, kiam li forrabis la fraŭlinon el la pensiono, ili ambaŭ estus kaptitaj, antaŭ ol ili repaciĝis kun la grafino, kaj ĉio estus okazinta alimaniere."

„Ho Dio, plej bela grafina moŝto", mi kriis, „mi jam tute ne scias, kie staras mia kapo pro multaj neatenditaj novaĵoj. Do la sinjoro Leonhard —?"

„Jes, jes", ŝi interrompis mian parolon, „tiel li nomiĝis en Italujo; al li apartenas la bienoj tie transe, kaj li nun edziĝos kun la filino de nia grafino, kun la bela Flora. Sed kial do vi nomas min grafino?"

Mi rigardis ŝin grandokule. —

„Mi ja tute ne estas grafino", ŝi daŭrigis; „nia grafina moŝto nur akceptis min ĉe si en la kastelo, kiam mia onklo, la pordisto, tien ĉi kondukis min kiel malgrandan infanon kaj kompatindan orfinon."

Nun mi vere sentis ne alie, kvazaŭ ŝtono falus de mia koro! „Dio benu la pordiston", mi respondis tute ravite, „ĉar li estas nia onklo! Mi ĉiam altestimis lin."

„Ankaŭ li havas bonan koron al vi", ŝi respondis; „se vi nur iom pli noble vin tenus! li ĉiam diras. Vi devas nun ankaŭ pli elegante vesti vin."

„Ho", mi kriis plena de ĝojo, „anglan frakon, pajloĉapelon kaj sakpantalonojn kaj spronojn! Kaj post la geedziĝa ceremonio ni vojaĝos for al Italujo, al Roma; tie ŝprucas la belaj fontanoj, kaj ni kunprenas la Prahajn studentojn kaj la pordiston!"

Ŝi ridetis kviete kaj tre gaje kaj afable rigardis min; kaj de malproksime la muziko senĉese sonis al ni, kaj raketoj flugis de la kastelo tra la kvieta nokto super la ĝardenojn, kaj la Danubo intermuĝis supren — kaj ĉio, ĉio estis bona!

— Fino —

EŬROPO VOKAS

ĈIUMONATA PAĜO POR LA EŬROPO-MOVADO ESPERANTISTA

Demokrata aŭ diplomata Paneŭropo?

La horo de la pruvo por Esperanto venis

La kaŭzoj, kiuj parolas por la unuiĝo de Eŭropo, estas tiel devigaj, ke neniu riskas, publike kontraŭi. Tamen la aro da kontraŭuloj ne estas malgranda. La personoj, kiuj profitis el la ĝisnunaj cirkonstancoj, ne volas forlasi la privilegiojn senbatale. Certe, kiel modernaj kaj ruzaj homoj ili estas kompreneble „paneŭropanoj". Sed en la obstineco, per kiu ili defendas siajn privilegiojn malnoviĝintajn, ili neniel diferencas de la egoismo de la princoj, kiuj en la pasinta jarcento malebligis la unuiĝon de Germanujo. (En aliaj landoj de Eŭropo la cirkonstancoj estis la samaj.)

La hodiaŭaj kontraŭuloj de la unuigita Eŭropo diras: Certe Paneŭropon, sed nur diplomatan Paneŭropon. Tiu Paneŭropo diferencus apenaŭ de la hodiaŭa. La popoloj restus fremdaj unu al la alia. Ĉiu influo kaj potenco estus ĉe la diplomatoj. Malsaĝaj vortoj de unu diplomato, pligrandigataj de la naciaj gazetoj, povus aliigi animstaton, kiu jam kaŭzis du mondmilitojn. Estas ja karakterize por la hodiaŭaj gazetoj, ke ili, kvankam volante esti paneŭropaj, per grandaj surskriboj pliigas eŭropajn diferencojn farante el kulo elefanton.

La Eŭropo, kiun ni volas, estas tute alia. En nia Eŭropo komprenu kiel eble plej multaj homoj unu la alian. Ni ne nur deziras, sed treege volas veran eŭropan societon de la popoloj. Ankaŭ tiuj homoj, kiuj ne havis sufiĉe da mono kaj tempo, por lerni fremdajn lingvojn, devas havi la eblecon korespondi kaj paroladi unu kun la alia. Se la laboristoj, la kampuloj, la metiistoj, la komercistoj kaj la oficistoj eŭropaj konatiĝas unu kun la alia, la paco estas pli bone garantiata ol nur per diplomataj artifikoj. Nur en demokrata Paneŭropa la paco kuŝas sur indaj manoj. Ĉar la simplaj homoj ne havas kaŭzon militi.

Sed Eŭropo demokrata ne estas ebla sen Esperanto. La egalrajteco de la popoloj eŭropaj ne permesas, ke unu el la naciaj lingvoj havu la privilegion, esti la oficiala lingvo de la nova Eŭropa. La horo de la pruvo por Esperanto nun ĉeestas. Ni bezonas Esperanton kiel fratan komunikilon de la popoloj, kiel supernacian lingvon de vera eŭropa gazeto, kiel oficialan lingvon en la eŭropa parlamento.

Ni Esperantistoj estas pacemaj. Sed ni ne kredu, ke Paneŭropo povas esti rikoltata kiel matura frukto senlabore. Jam denove ekzistas organizoj kiuj, pretekstante restarigi la honoremon de la popoloj, aligas opinaron, el kiu jam eliris du militoj.

Unuigu ni niajn korojn kaj niajn fortojn!

Ni estos fortaj, se ni nur volas.

Dr. Jos. Holtmann-Beckum.

Dr. W. Drees

la ĉefministro de Nederlando skribas:

Nia proksima celo

Volonte mi esprimas mian simpation rilate al via ideo, eldoni Eŭropan gazeton en Esperanto.

La signifo de Eŭropo en la mondo malfortiĝis. Du militoj en kvarona jarcento disŝiris kaj malriĉigis ĝin. Ili ankaŭ ege ŝanĝis la rilatojn kun aliaj mondpartoj. Eŭropo ne plu havas la gvidan lokon, kiun ĝi okupis en la pasinteco. Ĝi tamen ankoraŭ estas riĉa fonto de kulturo, forta faktoro en la ekonomia evoluo kaj en la progresado de scienco kaj tekniko.

Se la ankoraŭ libera parto de Eŭropo volas teni sin kaj esti sufiĉe forta por plenumi la gravan taskon al kiu ĝi ankaŭ nun estas vokata, tiam pli da unueco estas necesa; unueco, kiu jam nun ekrealiĝas en diversaj formoj.

De la Esperantistoj, kiuj volas faciligi la internaciajn rilatojn per mondhelplingvo, oni aparte povas atendi komprenon pri la proksima celo, kiu en Eŭropo devas esti realiĝonta. Konsiderante la malfacilaĵojn, kiujn kaŭzas la lingvo-diferenco en la interrilatoj, Esperanto povus, kiel helplingvo — ankaŭ ĉe la kreskanta unueco en Eŭropo — fari gravajn servojn.

Mallongaj raportoj

Bonn. Kun granda intereso la „Internationale Studentenbund" aŭdis paroladon de Prof. Lucien Laurat, Paris, pri la eŭropaj problemoj.

Marienberg (Westerwald). En la „Europa-Haus e. V., Haus der Jugend", parolis Prof. Laurat, Paris, pri eŭropaj problemoj, speciale pri la francaj-germanaj rilatoj.

Beckum (Westfalen). La „Katholische Kaufmännische Verein" invitis D-ron Holtmann paroli pri la temo: Demokrata aŭ diplomata Paneŭropo?

Nur unuiĝo fortigas nin!

Ni esperantistoj jam delonge konas la malfortojn de la aliaj organizoj. Sed ni mem ankaŭ faris erarojn. Ni volas pacigi la mondon, sed ni forgesas, ke la unua paŝo por tio devas esti la pacigo de Eŭropo. Ni devas progresi paŝo post paŝo. En ĉiu lando de Eŭropo estas multaj esperantistoj, kiuj pensas kaj sentas la samon kiel ni. Solaj ili estas malfortaj. Oni mokas pri ni. Se ni unuiĝos, ni estos tre fortaj. Tiam ni ne nur povos nin defendi, sed ankaŭ ni povos ataki ĉiun, ĉie kaj ĉiam. Sed organizo nur estas ebla per daŭra ligilo. Sen gazeto kiel vivanta interligilo ĉiu movado estas mortkondamnita.

Ni ne volas fondi novan gazeton. Jam estas tro multe da ili. Pro tio ni petis la „Esperanto-Post" publikigi niajn sciigojn. Ni tre dankas al la „Esperanto-Post", ke ĝi estas preta por tio, kaj ni petas niajn amikojn konsideri la „Esperanto-Post" kiel nian organon.

Nun ni petas niajn amikojn:

Aniĝu!
Organizu lokajn grupojn!
Subtenu nian gazeton!
Varbu abonantojn!
Sendu mallongajn raportojn!
Varbu anoncojn!
Sendu al ni la adresojn de interesuloj!
Estu pioniroj por la nova Eŭropo, via estonteco!

Tiam ni kreskos kaj fortiĝos.

LINGVA KONSILEJO

Aktuala Terminareto

* = neologismo, ne trovebla en la E-a literaturo
bs = Butin und Sommer, Wörterbuch E/D
W = Wüster, Enciklopedia Vortaro
Z = Zamenhof

Amok laufen amok/i*. **~läufer** -ulo
Außenstehender eksterulo, kromper-sono (= ein Dritter), flanka p. (Z)
die Belange la interesoj
Benelux Benelukso*
Brisanz eksplod/forto detru-
dosieren dozi
eklatant 1) sensacia, skandala; 2) (okul)frapa, -videbla, klara
fair lojala
Gaswerk gasfarejo
Gegenmutter (techn.) kontraŭŝraŭb-ingo
Jersey (Stoff) jerzo (bs)
(das) Meeting renkontiĝo
(das) Nonplusultra nesupereblaĵo
Preß/kopf prem/kapaĵo. **~span** -kar-tono
Prüfstand (techn.) esplorbenko
Pullover, Jumper [über den Kopf zu ziehende Strickbluse] pulovro* (jerzo = Sweater [wollene, gestrickte Sportjacke])
Sabot/age sabot/ado. **~eur** -anto, -ulo
sanitär sanitara
synthetisch (= Kunst..., z. B. Kaut-schuk) sintezita
Soforthilfe tuja kapitalhelpo
die Sudeten la Sudet/oj; hiervon: -lando
Tramp 1) vagulo, vagabondo; 2) kaŝ/veturanto; pet-
versiert faksperta
vital 1) plejgrava, tuŝanta la vivon (z. B. ~e Interessen); 2) vivoforta
Windjacke ventojako

La sekvantaj linioj havas karakteron eĉ pli nedevigan kaj proponan ol la terminareto jam ĝenerale havas.

Oni foje devas okupi sin pri la literoj, kiuj ne havas E-an nomon. Laŭ mia opinio oni nomu pure naciajn literojn, kiel ö, ø, ß, per la naciaj nomoj; sed por la literoj q, w, x, y oni bezonas E-an nomon: ili estas internaciaj kaj ankaŭ en Esperanto ofte uzataj, ekzemple oni devas literumi nomon aŭ diri formulon kemian aŭ matematikan, kiuj enhavas tiujn literojn. Oni multon skribis en la lasta tempo pri liternomoj; mi mem proponas (laŭ aliaj) nomi ilin kuo, duobla vo, kso, ipsilono (W). Mi almenaŭ intencas uzi tiujn formojn en aperonta vortaro germana-Esperanta. Salutinda estus akademia decido pri la nomoj de tiuj literoj; sen tio oni ne venos al fino de l' diskuto.

Hans Wingen

Deci und konveni

Beide sind nahe Verwandte, die man leicht verwechseln kann. Laut Universala Vortaro hätten sie die gleiche Bedeutung. Dem ist aber nicht so. Deci bedeutet ziemen, sich geziemen, schicklich sein, sich gehören, sich passen (volkstümlich). Konveni heißt passen, genehm sein, zusagen, konvenieren. Beispiele: Via konduto ne decas = dein Benehmen schickt sich nicht; kiel decas = wie es sich gehört. In deci steckt also der Begriff der guten Sitte.

Via vizito ne konvenas = dein Besuch ist nicht genehm bzw. paßt nicht. Mit Moral hat also konveni nichts zu tun.

Im Englischen sagt man: That's indecent = das ist unschicklich; your visit is inconvenient = dein Besuch ist nicht genehm. Das Englische unterscheidet mit den gleichen Wortstämmen wie Esperanto.

Was verursacht nun die häufigen Verwechslungen? In der Umgangssprache sagen wir oft: Das paßt sich nicht für einen anständigen Menschen (decas); das paßt mir gar nicht (konvenas). In beiden Fällen ist „passen" das tragende Wort. Im Polnischen liegt der Fall ähnlich.

Im UV handelt es sich um offensichtliche Übersetzungsfehler, die sich nach obigem leicht erklären lassen. Im Gebrauch der Wörter hat Zamenhof wohl zu unterscheiden gewußt, wenn sich deci und konveni hier und da auch sehr nahe kommen. Bei jedem genialen Wurf zeigen sich kleine Mängel, die mit der Zeit von selbst verschwinden. Also nochmals: Deca konduto und konvena vizito.

M. Butin

Ĉagreni

ist ein zielendes (transitives) Zeitwort und bedeutet: ärgern, Kummer bereiten, verdrießen, z. B. la perdo ĉagrenis min oder mi ĉagreniĝis pro la perdo, weil „ĉagreniĝi" senti ĉagrenon bedeutet. Mensch, ärgere dich nicht = homo, ne ĉagreniĝu! Ne ĉagrenu vin wäre hier sinngemäß nicht passend, denn man ist ja nicht selbst der Urheber eines „Sichselbstärgerns", sondern gerät in den Zustand eines „Verärgertwerdens" durch ein Spiel, das ja wohl jedem bekannt sein dürfte. Ein Kind, das einen dauernd ärgert, ist ein ĉagrenanta infano, und eine ärgerliche Angelegenheit eine ĉagrena afero.

Belustigend wirken daneben „ärgerliche Handschuhe" ĉagrenaj gantoj statt ĉagrinaj gantoj (Handschuhe aus Chagrin-Leder). Es handelte sich aber gottlob nur um einen Satzfehler in einer Esperanto-Erzählung.

M. Butin

Diferenci

Auch bei diesem Zeitwort besteht vielfach Unklarheit in der richtigen Anwendung. Es ist ebenso wie indigni nichtzielend mit der Bedeutung „sich unterscheiden", z. B. ili forte diferencas inter si per la saĝo (Z), tiuj projektoj abisme diferencas de Esperanto, li estas diferenca je (de, al) sia frato. Aber diferencigi la verbojn laŭ trancitiveco kaj intransitiveco, diferencigi la juston de la maljusto; mi faras diferencon inter ambaŭ okazoj (Z).

M. Butin

Halsschmerzen

Manche Damen sind unglücklich darüber, daß sie einen kurzen, gedrungenen Hals haben; gelegentlich haben sie auch Halsschmerzen. Im deutschen nimmt man es nicht so genau; einmal ist es der äußere und dann wieder der innere Hals. Im Esperanto kann man diese „Hälse" klarer unterscheiden. Halsschmerzen sind doloroj en la gorĝo und ein kurzer Hals ein mallonga kolo. Gorĝo bedeutet Kehle, Gurgel. Zamenhof spricht von einem osto en la gorĝo, freŝa mielo estas dolĉa por la gorĝo. Um es kurz zu sagen: gorĝo ist der innere Teil des kolo, und kolo der Körperteil, der Kopf und Rumpf verbindet.

M. Butin

„La Studento"

En la universitatoj la granda utileco de Esperanto ĝis nun ne estas sufiĉe bone konata. Tiu fakto estas bedaŭrinda kaj ŝanĝenda, ĉar la universitatoj estas la edukejoj de la decidantaj personoj de morgaŭ.

Ŝanĝi tion estas la intenco de la nove fondita „Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj" (altlernejano = germ. „Akademiker"). Ĝi volas apliki Esperanton en la klopodoj por plibonigo de la internacia kontakto inter la studentoj diverslandaj kaj la altlernejanoj interesitaj je studentaj problemoj. Por atingi tiun plibonigon ĝi volas eldoni revuon „La Studento", volas aranĝi internaciajn renkontojn (IKESA 1952: Schluchsee/Schwarzwald; 1953: Ljubljana/Jugoslavujo), volas funkciigi Interfakan Helpservon (Delegita Reto) kaj volas kunlabori kun ĉiuj internaciaj studentaj kaj kulturaj organizaĵoj.

Por efektivigi tiujn intencojn IFESA nepre bezonas la kunhelpon de ĉiuj Esperantistaj studentoj, do ankaŭ la vian! Vi ja konscias, ke la universitata tereno estas tiom grava, ke Esperantista aktiveco sur ĝi estas nepre necesa. Nur pro tio ili riskis tiun paŝon sur nova tereno, kaj ili nun esperas, ke la Esperantistaj studentoj de Germanujo ne malatentas ilin.

La membrokotizo estas por Germanujo 6,— gmk por unu jaro. IFESA nur ekfunkcios de la 1-1-1953, sed vi estas petata, jam nun anonci vin, por ke la laboro vere povu komenciĝi je tiu tago. La anonco kaj la pago estu direktataj al la Loka Studenta Esperanto-Klubo, aŭ se tia ne ekzistas, al la Landa Delegito por Germanujo, tute aŭ en partoj de 1,— gmk por po du monatoj. La membroj ricevos la Federacian Organon „La Studento", ĝuos la avantaĝojn de la Interfaka Helpservo kaj povos ĉeesti la konferencojn de IFESA. Krom tio la membroj helpas la disvastigadon de Esperanto ĉe la universitatoj kaj per tio antaŭenpuŝas nian aferon je plua paŝo.

Werner Bormann,
Landa del. de IFESA por Germanujo,
Flensburg-Mürwik, Blücherstr. 17
Poŝtĉekkonto: Hamburg 1225 99

Auf dem Büchertisch

Einzeln eingehende Bücher usw. werden erwähnt, doppelt eingehende besprochen

Trojlo kaj Kresida de William Shakespeare. Proze tradukita de Stephen A. Andrew. Prezo 2 ŝil. 6 p., afranko 2 p. Formato 12×18 cm, 96 paĝoj, bone broŝurita. Eldonita de The Esperanto Publishing Company Ltd. Aĉetebla ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe UEA, Rickmansworth, Anglujo.

Die Kennzeichnung dieses echt Shakespeareschen Stückes als „Tragedio-Komedio", also tragische Komödie oder komische Tragödie, soll auf den ersten Verleger zurückgehen, der sich über den Charakter des Stückes nicht klarwerden konnte. Trotz des starken lustspielhaften Einschlags möchte man dieser „höhnischen Parodie des Griechentums" doch mehr die Einreihung unter die Trauerspiele zubilligen. Am neutralsten dürfte aber die Beurteilung sein, die diese schwierige klassische Satire als wohl widerspruchsvollstes Schauspiel Shakespeares ansieht.

Der Übersetzer reihte dieses Stück in die Trilogie der „Liebespaar"-Werke ein: zu „Antonius und Kleopatra" und „Romeo und Julia". Tatsächlich entspricht eine solche Einreihung den Titeln und auch dem Inhalt, nur sind in den drei Werken die Liebespaare wesentlich voneinander verschieden. In „Troilus und Kressida" finden wir Liebe und Treue und Untreue in allen Varianten gemischt. Troilus wirkt etwas süßlich, Kressida entwickelt sich zum Schluß zu einer regelrechten Kokotte.

Das Stück ist überreich an geflügelten Worten und eignet sich ohne weiteres zu einer zeitgemäßen Auslegung.

Die Handlung spielt gegen das Ende des Trojanischen Krieges; es herrscht Mißstimmung im griechischen Heer. Achilles schmollt, Odysseus spinnt Ränke, und Thersites (den man beinahe für den klügsten von allen halten möchte) gibt seiner Meinung unverblümt in den schärfsten und bissigsten Worten Ausdruck. In der 1. Szene des 2. Aktes zum Beispiel findet sich ein fast unübertrefflicher Dialog gegenseitiger Beschimpfung zwischen Ajax und Thersites. Wenn dieser beispielsweise irgendwo sagt: Li portas sian cerbon enventre kaj siajn intestojn enkape, ist das nicht witzig, giftig und humorvoll zugleich?

Und wenn Hektor von Aristoteles spricht (S. 35), der mindestens 700 Jahre später lebte, und wenn Troilus den Ausspruch tut: Diablojn faras timoj el keruboj, ist das nicht die Sprache einer Komödie?

Die Prosaübersetzung wird natürlich die Schönheiten der Verse Shakespeares nicht bieten. Oft wirkt sie auch, bewußt oder unbewußt, das weiß ich nicht, geschraubt und gekünstelt. Die nachgestellten besitzanzeigenden Fürwörter, oft noch mit dem Artikel vor dem Hauptwort, das meist ganz ans Ende des Satzes zurückgeschobene Zeitwort verstoßen gegen den gewohnten Fluß der Sprache.

Der Übersetzer ist bestimmt nicht nur ein guter Esperantist, sondern er versteht es auch, aus dem Reichtum der Sprache zu schöpfen und sie dem Shakespeareschen Geiste anzupassen. Natürlich findet man daneben auch allerlei, worüber man anderer Meinung ist. Aber das soll hier nicht besonders herausgestellt werden.

Die Lektüre dieser Tragedio-Komedio kann aus vielen Gründen nur empfohlen werden, nicht allein, weil Shakespeare der „plej renoma (Lieblingswort des Übersetzers) dramaŭtoro en la mondo", sondern auch der bekannteste (durch die große Anzahl der Übersetzungen seiner Werke) in Esperantujo ist. Mm.

Volo kaj vojo de Saarlando. Reden des Ministerpräsidenten Johannes Hoffmann und des Parlamentspräsidenten Peter Zimmer in der 100. Sitzung des saarländischen Parlaments am 6. 4. 1951. Format 14,5 mal 21 cm, 20 Seiten, mit farbigem Umschlag (Wappen). Herausgegeben vom Informationsdienst der Saarregierung. Preis nicht angegeben.

Diese politische Broschüre in Esperanto — warum sollte unsere Sprache nicht auch der Politik dienstbar gemacht werden können? — enthält zunächst eine Landkarte des Saargebiets, eine Außen- und eine Innenansicht des Parlaments in Saarbrücken, und dann die beiden Reden. In einer Vorbemerkung waren die Möglichkeiten genannt, die sich der Saarbevölkerung 1935 boten: 1. Rückkehr ins Reich, 2. Anschluß an Frankreich, 3. Fortsetzung der Verwaltung durch den Völkerbund. Eine 4., nämlich die Autonomie, war im Versailler Friedensvertrag nicht vorgesehen.

Die beiden Reden nun gehen von diesen Möglichkeiten aus. Die Schlußfolgerungen sind: Justa estas, kio servas la pacon, kaj la pacon servas, kio servas Eŭropon. La Sar-problemo trovos sian naturan solvon en unuigita Eŭropo, und: La sarlanda problemo estas solvebla nur en maniero eŭrope-familia; al tio Franclando kaj Germanlando estas, pro Eŭropo, devigitaj. Sarlando ne volas esti problemo.

Ich habe Sarlando geschrieben, obgleich die Broschüre (m. E. unnötigerweise) Saarlando gebraucht. Das Esperanto ist gut, flüssig und klar. Uneinheitlich ist die Verwendung von federala, federita und federacia, unlogisch und unschön Rheino (Rejno) und Rheinawestfalia (rejna-vestfalia). Ein unangenehmer Druckfehler S. 10 oben: gajni la francan polon (anst. popolon).

Jfb.

Esperanto, Mittler der Weltliteratur, von Wilhelm Theodor Oeste. Format 15×21 cm, 96 Seiten, zweifarbiger Umschlag, gut kartoniert. Siegfried Ziegler Verlag, München-Pasing. Preis 4,50 DM.

Der Verfasser dieses Buches hat sich eine besondere Aufgabe gestellt: Er will an Hand von Übertragungen aus der Weltliteratur das Bewußtsein vermitteln, daß Esperanto tatsächlich eine lebendige und sehr schöne Sprachschöpfung ist, deren Anspruch, Welt(hilfs)sprache zu sein, zu recht besteht.

Einleitend wird dem Leser eine Übersicht über die Entstehung des Esperanto und über die Absichten seines Schöpfers Dr. Zamenhof gegeben.

In der „Struktur der Weltsprache" werden besonders die Formen des Zeitworts die Aufmerksamkeit auf sich lenken. Die Tabellen zeigen die reichen Bildungsmöglichkeiten, werden aber den einen oder andern etwas verwirren. Auch die Verdeutschung der in der gewöhnlichen Sprache fast nie gebrauchten Formen -u -ota(j) usw. wirkt etwas gezwungen. Die Zusammenstellung von über 200 Ableitungen aus einem einzigen Stammwort (mit Hilfe der Bildungssilben) wird jedoch selbst manch langjährigem Esperantisten eine Überraschung bedeuten.

Um dem Vorwurf zu begegnen, der Esperanto-Wortschatz sei „zusammengestoppelt", bringt der Verfasser Beispiele aus verschiedenen Sprachen, die zeigen, wie dort die Wörter aus mannigfaltigsten Quellen zusammengeflossen sind. Dabei wird gar mancher mit Erstaunen feststellen, daß Wörter, die er bisher für „echt deutsch" hielt, einen ganz andern Ursprung haben.

Sehr interessant sind auch die Vergleiche vieler Esperanto-Wörter mit solchen anderer Sprachen. Wie klug und vernünftig hat doch Dr. Zamenhof in den allermeisten Fällen seine Auswahl getroffen!

Nachdem Oeste gezeigt hat, daß eine „künstliche" Sprache, weil aus menschlichem Gehirn entstanden, sich dem menschlichen Denkvermögen genau so anpaßt wie eine stets mit Unvollkommenheiten behaftete „Natursprache", kommt er dann zu deren Eignung für die Weltliteratur.

Wäre Esperanto nicht eine lebendige Schöpfung, es wäre längst schon ausgestorben wie andere willkürliche Sprachgebilde vor und nach ihm, denen das Geheimnis der inneren Kraft des Esperanto nicht innewohnte. Seine lebensnahe Elastizität zeigt sich am anschaulichsten bei Übertragungen aus anderen Sprachen.

Und nun werden uns eine ganze Menge Übersetzungen geboten aus Homer, Sappho, Horaz, Li Tai-Pe, Shakespeare, Byron, Puschkin, Lermontow, Heine, Uhland, Goethe, Hölderlin, C. F. Meyer, Bjørnson, Ibsen, Verlaine, Périé. Die einzelnen Stücke erscheinen im Urtext, in Esperanto und deutscher Übertragung untereinander, so daß eine Vergleichsmöglichkeit ohne weiters gegeben ist.

Auf die einzelnen Esperanto-Übertragungen einzugehen, würde hier viel zu weit führen. Es fällt aber der Mangel jeglichen Prosastückes auf. Auch darin hat Esperanto doch Bedeutendes geleistet. Die Einschätzung der einzelnen Übersetzungen wird vermutlich nicht bei jedem Leser gleich ausfallen. Oeste bedient sich z. B. neben den üblichen weiterer „dichterischer Lizenzen", die

Nia krucvort-enigmo



Die zu suchenden (Esperanto-) Wörter bedeuten:

Waagerecht: 1. Zwiebel, 3. kastrierter Hahn, 6. Bildungsnachsilbe, 7. weibliche Brust, 8. Ausrufwort, 9. weich, 12. Element, 15. selten (Neuwort, mit Endung), 17. Einfassung, 19. Teil einer Zelle, 21. Bindewort, 23. bekanntes deutsches Scheuermittel, 24. Bildungsvorsilbe, 25. Landkarte, 26. Bindewort, 27. östliche Provinz Frankreichs, 28. Teil des Schiffes.

Senkrecht: 1. bekannter altrömischer Feldherr, 2. Bildungsnachsilbe, 3. Zimmerpflanze, 4. Bildungsnachsilbe, 5. Zeitangabe, 7. südeuropäisches Fürstentum, 10. Papageienart, 11. wichtig für die Gesundheit, 13. etwas in eine Flüssigkeit stecken, 14. schwarze Flüssigkeit, 16. Zusatz zum Tee, 18. geschieht im Frühling, 20. Abschnitt der Jura-Formation, 22. hoher Grad, 26. Fürwort.

Die Wörter sind ohne grammatische Endungen.

teilweise sehr weit über das Fundamento hinausgehen. — Seine Bemerkungen zu den einzelnen Stücken sind getragen von dem heißen Bestreben, die Eignung des Esperanto zur treffenden Wiedergabe so recht sinnfällig zu machen. Und das ist ihm auch gelungen.

Das Buch ist infolge seiner hohen Auffassung und seiner nicht immer leichten Sprache nicht für die Hand eines jeden geeignet. Wer es aber versteht, dem wird es viel Genuß bereiten. Mm.

Nia Lingvo Esperanto — Elektita poezio por deklamo kaj por kanto de Karl Vanselow. Unua kajero de unua kerio. Ardesia-eldono. Formato 10×14 cm, 32 paĝoj, fortike broŝurita. Prezo 0,50 DM (aŭ du respondkuponoj), por 10 4,50 DM, por 25 10,— DM. Berliner Esperanto-Verlag. Mendojn akceptas la eldonejo de Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/L., kaj la aŭtoro, Berlin W 35, Winterfeldtstraße 27.

Karl Vanselow, von dem der niederländische Esperantist F. J. Troost in „Heroldo" schrieb: Ĉiu el liaj poemoj estas juvelo, kiu ornamas la gazetfolion, sur kiu ĝi aperas, legt uns hier ein 32seitiges Heftchen mit eigenen Gedichten vor, auf die obiges Urteil völlig zutrifft. Die Gedichte sind wohl alle schon früher erschienen, aber man liest sie immer wieder gern. Ihre Einfachheit, sprachliche Genauigkeit und natürliche Frische machen sie zu einem geeigneten Lesestoff sogar für solche, die sonst für Poesie nicht viel übrig haben.

Es wird in den Esperanto-Gruppen meines Erachtens zu wenig deklamiert, zu wenig auswendig gelernt. Mit Recht sagt Vanselow: „. . . estas vere / ke per la ritmo kiel per la rimo / tre pliboniĝas la parolkutimo." Von diesen Gedichten eignen sich sehr viele zum Auswendiglernen. Mehr als die Hälfte ist nach bekannten Melodien verfaßt. Da die Übersetzungen oft aber sehr frei sind, ist es nicht immer leicht, die dazugehörige Melodie zu entdecken.

Zum Schluß gibt Vanselow in einem Gedicht noch besondere Anweisungen zum Dichten, rythmisch und gereimt. Es wäre für jeden angehenden Poeten von Nutzen, sie zu beherzigen.

Dem Büchlein möchte ich sein letztes Gedichtchen mit auf den Weg geben:

Invito

Aperu en amika nia rondo,
Helpante al la lingvo de la mondo,
Per ĝia uzo por la plu-prospero
Vi bone servos al la pac-afero.

Und nun erwarten wir die weiteren zwei Hefte der ersten Ardesia-Serie. Was Ardesia ist? Nun, ich will's zum Schlusse noch enthüllen. Auch ich habe mir lange den Kopf darüber zerbrochen: Aro da esperantistoj ideale amikaj.

J. F. Berger.

Jarlibro de UEA, Dua parto, kun unua parto de Fervoja Terminaro kaj kun resuma raporto de la progresoj des Esperanto dum la pasinta jaro. — Liverata nur al Individuaj Membroj de UEA. Formato 11×15 cm, 70 paĝoj. Universala Esperanto-Asocio Heronsgate, Rickmansworh (Herts.) Anglujo.

Das allbekannte Jahrbuch der UEA bietet schon seit längerer Zeit in seinem zweiten Teil neben allerlei wichtigen Nachrichten aus der Esperanto-Bewegung in aller Welt (Mitgliederstatistik, Bilanzen, Beitragsfragen, Vorstandsberichte) in diesem Jahr den umfangreichen Anfang eines Fach(wörter)buchs über das Eisenbahnwesen. Es beginnt mit der Darstellung, was alles vonnöten ist, bevor eine Bahnlinie angelegt werden kann. Darauf folgt ein diesbezügliches Wörterverzeichnis, worin ich die Erklärung des Wortes „trako" vermisse, das in den Zusammensetzungen „trakbazo, traksterni" vorkommt.

Der zweite Abschnitt behandelt den Eisenbahnbau und bringt wieder in einem besonderen Wörterverzeichnis die nötigen Fachausdrücke; dasselbe geschieht schließlich auch beim dritten Teil, der den Brückenbau beschreibt.

Es ist natürlich, daß bei einem solchen Fachgebiet viele technische Ausdrücke nötig sind, die der Laie nie braucht und über die er auch nicht urteilen kann. Aber man wird sich bestimmt auf den Verfasser des Terminareto, Edward M. Rosher, verlassen können, wenn er sagt: „Ĉi tiuj terminoj estas la rezulto de longa cerbumado kaj interkonsiliĝo kun inĝenieroj de aliaj landoj."

Für den gewöhnlichen Esperantisten bietet der erste Teil des Jahrbuchs eine Fülle nicht nur sehr brauchbaren, sondern äußerst wichtigen Propagandamaterials. Er wird über die Fortschritte der Bewegung in aller Welt unterrichtet. Die allgemeine Verwendung eines überall gleichen Schlagworts für die Werbung, wie es die Sveda Federacio vorschlägt („Se ĉiuj homoj eklernus Esperanton nun, ĉiuj popoloj senĝene komprenus unu la alian en du jaroj") wäre eine neue und bei andauernder Verwendung gewiß wirkungsvolle Form der Vorwerbung.

Noch ein paar Worte zur Sprache. Hier herrscht kein -io, hier herrscht -ujo, doch auch nicht ausschließlich. Alĝerio, Aŭstralio, Ĉilio, Etiopio, Rodezio — nun gut. Warum aber Kenjo (Kenia)? Und daneben Koreujo? Die Bewohner also Koreoj (gegen das allgemein übliche Koreaner)? Gegen Danujo und Polujo könnte man doch wohl nichts einwenden. Nein, es heißt Danlando, Pollando, vernünftigerweise auch Sarlando (mit **einem** a), doch unvernünftigerweise Finnlando (mit **zwei** n; ein Stamm Finland' wäre keinesfalls zweideutig!). Statt Kolombio sagte man besser Kolumbio, denn mit kolomboj hat das Land ja nichts zu tun, und das moderne Israel schriebe sich, im Gegensatz zum biblischen, besser Israelo, Hongkong in Esperanto lieber Honkongo. Wenn man Nov-Zelando schreibt, dann auch Nova-Kaledonio, Ora-Bordo. Der Bewohner wäre nämlich sonst ein ora bordano und nicht ein Ora-Bordano!

Jfb.

Hans Koch, **Das Esperanto-Examen.** Format 11×15,5 cm, 16 Seiten. Verlag Esperanto-Kurier, Offenbach/M. Preis 0,40 DM + 0,05 DM Porto. Erhältlich auch beim Verlag der Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/L.

Der Leiter des Direktoriums des Deutschen Esperanto-Instituts, Hans Koch, München, gibt hier in knapper, aber sehr klarer Form alles Wissenswerte über die Esperanto-Prüfungen bekannt. Er füllt damit eine fühlbare Lücke aus, denn die Prüfungsbestimmungen waren bisher in dieser übersichtlichen Weise nicht vorhanden. Man könnte dem Heftchen höchstens nachsagen, daß es die Esperanto-Prüfungen der Akademiker nicht berücksichtigt. Doch darüber dürfte das Institut sofort auf Anfrage die nötige Aufklärung geben.

Es wäre zu wünschen, daß dies Heftchen, das mindestens in die Hand eines jeden Gruppenvorsitzenden gehört, dazu beitragen möge, möglichst viele Prüflinge zu gewinnen. Der Mangel an diplomierten Esperantisten wird sich einmal zum größten Nachteil für Esperanto bemerkbar machen, wenn es z. B. von einer Regierung offiziell anerkannt und angenommen würde. Haben wir dann nicht die erforderlichen Kräfte, und sei es auch nur in bescheidenem Umfang, aufzuweisen, so kann sich das für Esperanto unter Umständen sehr bedenklich auswirken. Darum sollte jeder selbstbewußte Esperantist doch mindestens so bald wie möglich die Kapableco-Prüfung machen. Wie, sagt ihm das Büchlein, das hiermit bestens empfohlen wird. J. B.

La Migranto. Oficiala ligilo de la esperantistaj naturamikoj. Eldonita de la Turista Asocio „La Naturamikoj", Esperanto-fako (TANEF). Nro 2 Julio/Decembro 1952.

Das erste Heft des ‚Wanderers" wurde bereits in Nr. 6/1952 der EP eingehend besprochen. Das zweite reiht sich würdig an. Das Spiel des Nebels über dem Bohinj-See in den Julischen Alpen ist ein schönes Titelbild. Der Inhalt ist wie der des vorigen Heftes vielseitig und gediegen, z. B. der Aufsatz „La signifo de la naturamikeco"; interessant sind die Schilderungen der Grotte Postojna in Jugoslawien, Reisen nach Monaco, in die bayrischen Berge, den Schwarzwald und vor allem die fesselnde Beschreibung der Gegensätze auf einer Reise durch Italien von Dr. Hermine Leubner.

Die Illustrationen sind durchweg gut ausgewählt.

Das Esperanto ist nicht gleichmäßig gut. An manchen Stellen ist es etwas holperig; die Behandlung der Eigennamen müßte einheitlicher sein. „Montreuxaj" finde ich in einem Esperanto-Text wenig schön. Warum nicht „Montreaj", „Vevaj" und „Lozanaj", nachdem man vorher erklärt hätte, daß Montreux = Montreo, Vevey = Vevo kaj Lausanne = Lozano ist? Die Druckfehler haben sich besonders auf den letzten Seiten ein Stelldichein gegeben.

Aber „La Migranto" gehört doch zu unsern schönsten Fachzeitschriften.

Mm.



Konferenco de la Grandaj Kvar

pelikanoj en iu zoologia ĝardeno certe havas grandajn problemojn por solvi. Oni vidas tion laŭ la seriozaj mienoj de la dignaj reprezentantoj el la pelikana mondo.







Für Kenner und Liebhaber

der griechischen und lateinischen Literatur

erschienen bisher drei Bände:

Platon, Apologie des Sokrates (Schröfel)
56 Seiten, broschiert 1,80 DM, gebunden 2,40 DM

Vergil, die Äneis (Mohr)
171 Seiten, broschiert 3,80 DM, gebunden 4,40 DM

Plutarch, M. Tullius Cicero (Atzert)
80 Seiten, broschiert 2,10 DM, gebunden 2,70 DM

Die Bändchen sind einheitlich im Format 12×19 cm, bringen eine Einleitung, sachliche Anmerkungen, Namenindex, Literaturnachweis, Karten usw.

Durch alle Buchhandlungen zu beziehen aus dem Verlag der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/L.

die Altklassische Schriftenreihe in deutscher Sprache

In die Hand *eines jeden Esperantisten gehört das*

Wörterbuch

Esperanto - Deutsch

Von Max Butin und Josef Sommer

Die beiden Autoren und Mitarbeiter der Esperanto-Post sind Bürgen für ein einwandfrei zusammengestelltes Wortmaterial. Außer den über 11000 Stichwörtern mit ebenso vielen Ableitungen enthält das Buch neben den Übersetzungen auch lexikographische Angaben, wodurch es doppelt wertvoll ist. Es wird jedem Esperantisten sehr gute Dienste tun.

244 Seiten, 12 × 17 cm in Kaliko gebunden mit Goldprägung, 9.— DM zuzüglich 70 Pf für Porto und Verpackung.

Um jedermann die Anschaffung zu erleichtern, liefern wir das Wörterbuch auch weiterhin gegen Teilzahlung.

Durch alle Buchhandlungen und durch den Verlag der Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Esperanto-Abteilung

ZUR BELEBUNG DER GRUPPEN-ABENDE

Der lang vermißte und geeignete Lesestoff

12×19 cm, 70 Seiten mit 15 Zeichnungen im Text in schönem zweifarbigem Kartonumschlag.
2,40 DM, zuzüglich 10% für Porto u. Verpackung

das tausendfachbewährte Lehrbuch von Wilhelm und Hans Wingen

80 Seiten Din A5 mit Wörterverzeichnis und Merkblatt für Kursusleiter 2,- DM. Dazu den Schlüssel zu 80 Pf zuzüglich 10% für Porto und Verpackung

durch alle Buchhandlungen

Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg. Herausgeber: Ludwig Goppel, Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstr. 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —,12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17, Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL